


HELIKO

GAZETO DE LA KOMUNUMA ESPERANTO ORGANIZAĴO RIJEKA

LA 4-a JARO - NUMERO 14 - OKTOBRO, 1985.



Gazeto de la Komunuma Esperanta-organizaĵo - Rijeka
List OK Saveza za esperanto - Rijeka

Ĉefredaktoro: Damir Rak

Gl. urednik :

Lektoro: Anja Hurčak

Lektor :

Adresa de la redakcio: Esperantista societo
"A.Š.Turković"
Korzo narodne revolucije 2a/III
51000 R I J E K A

Telefono: (051) 34-670

Presita en: Vera Hofbauer, Rijeka
Ŝtampano u:

Kunlaboris: Rado Škalamera, Slobodan Vitolović,
Sudjelovali: Vjekoslav Morankić, Domenika Vanić,
Nataša Rončević, Arijena Jovanović,
Remza Begić, Slavko Šimunić, Jagoda
Halužan, Sanja Stanojević, Irena
Barković, Jasna Barković

Titolpaĝo:

Naslovna stranica: VANJA MUŠNJAK

ENHAVO:**PAĜO:**

Aleksandar - Šandor Turković	1
Uŝpon i pad "Helika"	1
Esperantaj pioniroj inter la maristaro	2
Poezio de Vjekoslav Morankić	10
Festivalo de kroatia esperanta kulturo en Kumrovec	11
Sukces plenaj seminarioj	14
Spomenka ricevis altegan klasifikon	17
Oficiale enskribitaj en lernejoj atestoj	18
Niaj jubileantoj	19
Monumento al Ivanka Trohar	20
La geedzoj Goodheir en la rondo de esperantistoj en Rijeka .	21
Du trionoj de la mondo parolas dekkvin lingvojn	21
Intervjuoj	22
La lingvo fundon ne havas	25
Internacia gejunula renkontiĝo	32
Informo al tutmonda esperantistaro	44

Aleksandar - Šandor Turković

Sur la kovrilpaĝo de ĉi tiu numero de "Heliko" troviĝas desegnaĵo de Aleksandar-Sandor Turković, desegnita fare de Vanja Mušnjak, studentino el Rijeka.

Aperigante ĉi tiun bildon, "Heliko" ankoraŭ unu fojon emfazas simbole ke la jaro 1985. estas la Internacia Junulara Jaro. Sed, kial ĝuste per Turković?


Unue, ĉar A.Turković estis elstara progresema, revoluciema esperantisto, murdita en sia 32. jaro far ustaĝoj. Due, ĉar la E-societo en Rijeka jam preskaŭ kvardek jaroj portas la nomon "A.Š.Turković".

Aleksandar Turković naskiĝis en 1909 en Zagreb, kaj en aŭgusto 1941 pafmortigita en Zagreb. Li studis juron kaj samtempe laboris en la redakcio de "Hrvatska naklada". Li aktivis en sindikatoj. Pro sia politika aktiveco li estis arestita jam en la jaro 1932. Li estis tre aktiva esperantisto. Kunlaboris en "La suda steio", gvidinte la rubrikon "Esperanto tra la mondo". Li gvidis kursojn kaj grupvesperojn en la "Akademia Esperanto Klubo" kaj en "Laborista Esperanto societo". Li estis fakdelegito de IEL por ĵurnalismo.

R.Š.

Uson i paĝ "Helika"

Kvankam en sia impresumo "Heliko" nomiĝis monata gazeto (trinumero 11, 12, 13 - MARTO, APRILO, MAJO), pro la financaj malfacilaĵoj la gazeto ne estas monata, nek trimonata, sed duonjara, ĉar ĉi-jare, bedaŭrinde, eliros nur du numeroj.



Redakcio

ESPERANTAJ PIONIROJ INTER LA MARISTARO



Bakar kaj Lingvo Internacia


Malnova urbeto Bakar, konate kroata marista nesto dum pluraj jarcentoj, okupas spartan lokon ankaŭ en la historio de internacia lingvo en nia lando.

La Marista lernejo (Ĥeŭtiko) en Bakar, fondita en la jaro 1849-a, ĉiam plenumadis olstaran rolon en la vivo de Bakar, kaj de sia ĉirkaŭaĵo, precipe por ke el ĉi aspektis bona edukita, merta, Hornakabano de jugoslavia maristaro. Serio da lernejoj profesoroj, sciencistoj kaj verkintoj (kelkaj el ili eĉ fondintoj) laboris kaj prelegis en la Ĥeŭtiko de Bakar: dro Andrija Mohoroviĉić,

profesoro de matematiko kaj fiziko, meteorologo kaj tre fama seismologo; Narcis Demin, profesoro, sciencisto kiu skiris mondan renomon en aranologio; Juraj Cacić, kapitano, profesoro pri naŭtiko kaj matematiko, pedagogo, verkisto kaj politikisto; profesoro Aleksandar Lochner, aŭtoro de nia unusola vortaro; profesoro dr. Milan Drvodelić, fama nia vortaristo, ankaŭ li aŭtoro de la unusola vortaro... Plie poste ni devos menciigi ankaŭ almenaŭ du gloraĵojn "Hornakabonojn", du marajn lupojn el la epoko de velŝipoj.

Sed, ni esperantistoj havas specifan intereson por iuj elstaraj personoj el la Nautiko, ĉar ili estas pli aŭ malpli ligitaj al la ideo de internacia lingvo. Iliaj nomoj estas: profesoro Juraj Bauer, profesoro Milan Miholjević, profesoro Milivoj Mihaljević, kapitano Franjo Široka, inĝeniero Mirko (Eberiko) Schönberger kaj Esperanta verkisto Nikolao Schlov.

RADOJICA F. BARBALIĆ - IVO JURKOVIĆ



Titolpaĝo de la libro "Oploviti Cape Horn" (Ĉirkaŭnavigi Hornan Kabon")
far Radojica F. Barbalić kaj Ivo Jurković

Iru ni laŭ la ordo. Anticipe ni diru lomete pri la fontoj. La unuajn informojn oni povas ricevi ĉe "Historio de Esperantomovado en Jugoslavio" far Marinko Gjiivoje kaj el la "Leksikono de aktivaj Jugoslavaj esperantistoj" far M.Gjiivoje. Ankaŭ en "Stoljeĉime desperatno a onda esperanto" M.Gjiivoje mencias Bakar. Post kiam mi ekkonis tiujn elementajn fontojn, mi korespondis kun Marinko Gjiivoje kaj li donis al mi bonajn konsilojn. Mi vizitis Bakar kaj tie la Naŭtikon (la bibliotekon de 16.000 libroj) kaj Muzeon de Bakar. Poste mi vizitis Poviĉani i pomorski muzej en Rijeka. En la Ŝtata biblioteko en Rijeka mi trafolumis jarkolektojn de tiemaj taggazetoj. "Primorske novine", "Riječki novi list" kaj "La Bilancia". Poste mi traegis "Grad Bakar kroz vjekove" far Ivo Karoĉino. "Problem međunarodnog jezika i esperanto" far dro T.Velnić. "125-obljetnica pomorskog školstva u Bakru", monografion de la lernejo, kaj la libron "Oploviti Cape Horn" (Ĉirkaŭnavigi Hornan Kabon) far Redojica F.Barbalić kaj Ivo Jurković. El la Nacia kaj universitata biblioteko en Zagreb mi ricevis fotokopion de artikolo el "Jugoslavenski pomorec" "Pomori i esperanto". Tiuj informoj, mi trovis en "Jugoslavenska enciklopedije", iujn en la libro de Petro Stojan "Bibliografio de Internacia Lingvo". Interesan artikolon mi trovis en Ĵurnalo "Vjesnik". Interesegajn faktojn rakontis al mi paŭkses-dara kapitano Ivo Ĉargonja. antaŭ kvar jaroj. Poste mi parolis kun pluraj personoj en Bakar, en Kostrena kaj en Rijeka...

Lingvisto kaj interlingvisto Juraj Bauer

En "Jugoslavenska enciklopedije" notita estas scienca laboro de Juraj Bauer, lia lingvista verkaro.


Josip Bauer naskiĝis la 22-an de aprilo en la jaro 1848. (la Ventega Jaro) en Karlobag. Li mortis en sia 52-a jero en Zagreb, en la jaro 1900. (en la komenco de la jarcento). En Bakar li vivis kiel profesoro pri matematiko kaj fiziko en la Marista lernejo ekde la 17-an de decembro 1891 ĝis la jaro 1896.

En la Naŭtiko mi trovis metrikulan libron "Natica i sposobnik za učitelje kr. nautičke škole. Knjiga I" kie sub la numero 14 mi eksciis ke Juraj Bauer la gimnezion finis en Rijeka, kaj ke li studis ĉe la universitato en Vieno ekde 1869 ĝis 1872. ke li parolis krom kroate, germane, itale kaj france kaj ke li komprenis kaj legis slovene kaj hispane. Antaŭ ol veni en Bakar, li oficis en gimnazioj en Varaĝdin, Zagreb kaj Rijeka.



1 Panoramo de Bakar

2 Pozicio de la Marista lernejo en Bakar



La Marista lernejo (Naŭtiko) en Bakar

Tri jaroj li estis bibliotekisto-en gimnazio en Rijeka. Apartemitan honorarion li donacia al la biblioteko por ke ŝi havigu novajn librojn. Por tio gesto li ricevis lernejan laŭdon. Pribensu kion multe li ŝatis libron!

Profesoro Bauer estis volapükisto. En la jaro 1885-a li publikigis en Zagreb sian libron "Sovjetski jezik (Volapük), 1. Moja borba za nj, 2. Slovnica njezova". Kiam li havis 40 jarojn, en la jaro 1888-a, do unu jaron post la Zamenhofs Unua Libro, li publikigis sian propran projekton de internacia lingvo, Spelin. Dum li vivis en Bakar, en la jaro 1892-a li publikigis "Spelin-Wörterbuch" ĉe Kugli kaj Korbach. Sur la kovrilpaĝo estas skribite "Bakar bei Fiume", Bakar apud Rijeka.

Kiam en la jaro 1896, Bauer foriris el Bakar, unu knabo 12-jaraĝa apenaŭ komencis vizitadi la Maristan lernejon. Tamen, eble li konis profesoron Bauer, kaj eble ekde ke la profesoro venis al la juneco konante la unuajn nociojn pri la lingvo internacia. Tiu knabo estis Branko Široka, kiu pli poste estis mia ĉefa persone en ĉi-tiu priesperanta rakonto, el Bakar.

Sed, sekvu ni paciencie la kronologian ordon.

Milan Miholjević diskutis kun Zamenhof

Ekde la jaro 1902-a ĝis la jaro 1920. en la Naŭtiko en Bakar profesoro pri angla lingvo kaj pri historio estis Milan Miholjević. El la matrikule lerneja libro mi eksciis ke li naskiĝis la 21-an de aŭgusto en la jaro 1873. Antaŭ ol veni en Bakar li oficis en Varaždinske Toplice kaj en Osijek, kaj forirante el Bakar li oficis en Novi Sad, ĉie kiel mezlerneja profesoro. Li parolis krom kroate, ruse, ^{serbe} angle, france. Dufoje li vojaĝis al Anglujo studi modernajn lingvojn. Li estis membro de "Društvo hrvatskih književnika" kaj koresponda membro de "Hrvatski pedagoški književni zbor en Zagreb".

Kiel publicisto li kunlaboris en "Narodne novine", "Hapredak", "Great Thoughts", "To Morrow", "Travel" k.t.p.

En Rijeka li publikigis, en la jaro 1914, sian libron "Dojmovi i uspomene" (Imercsoj kaj memoroj) kaj en Zagreb, en la jaro 1919, "The Yugoslav question with special regard to the Coast of the Adriatic" (Jugoslavio problemo kun speciala rigardo al la Adriatika Marbordo).

Li skribis ankaŭ sub la pseŭdonimo Aramis.

Dum siaj studentaj jaroj li vojaĝis en Anglujon, en Francujon, Polujon, Germanujon kaj Rusujojn.

En la jaro 1922, en Zagreb oni eldonis "Pomorski rječnik" (Marista vortaro), entenanta 2,700 maristajn terminojn. Unu el kolektintoj de la marista terminaro (krom aliaj profesoroj en la Naŭtiko en Bakar) estis ankaŭ Milan Miholjević.

Bakarenoj kaj maristoj tre fieris pri la Naŭtiko en Bakar. Ili opiniis ke tiu lernejo indus tre grandan prestiĝon, pli eltranĝan ol, ekzemple, gimnazio. Tien renomon donis al la lernejo ĉiuj profesoroj, kaj inter ili ankaŭ Miholjević. Pri li, rakontis al mi kapitano Ivo Čargonja, kiu tre estimis lin kaj esprimis la plej belajn vortojn pri progresema Miholjević.

Miholjević ne estis esperantisto, sed li estis konata de prof. Bauer, amiko de Danica Bedeković kaj de Mavro Špićer, la unuaj elstaraj adeptoj de Internacia Lingvo en Kroatio. Sed la plej grava kaj por ni esecantisto la plej interesa fakto estas ke profesoro Milan Miholjević persone renkontiĝis kun dro Zemenhof. Li parolis, eĉ diskutis kun Zemenhof pri la tiama tre diskutinda temo: pri supersignoj. Por la historio de Esperante movado en nia lando tiu fakto tre grava, sed ĝis nun nenio plu estas publikita.

Pri tio mi eksciis la unuan fojon de Marinko Gjivoje. Marinko petis min kolekti faktojn pri la vivo de profesoro Miholjević en Bakar. Kiam mi demandis lin kiel li interesiĝas pri tiu profesoro, Marinko sciigis min ke nia elstara esperantisto dro profesoro Dalibor Brozović kolektas tiujn informojn por skribi pri Miholjević. Dalibor Brozović estas parenco de Miholjev ić. Nome, Milan Miholjević estis frato de la svino de Dalibor Brozović, laŭ la patrina linio. Do, per Dalibor Brozović estas Milan Miholjević trifoje interesa, kiel parenco, kiel kroata verkisto kaj kiel homo kiu kontaktis kun aŭtoro de Esperanto. Pri tiu kontakto Brozović legis en la taglibro de Miholjević.

Eble baldaŭ ni povos ion pli ekscii pri tiu interesa temo.

Milan Miholjević mortis en Zagreb en 1942.

Majstro albatroso, Esperanta pioniro inter maristaro

Mi jam diris ke la ĉefa persono de la rakonto pri Esperanto en Bakar estas Branko Širolo. Li estas entute tre interesa persono, rare kaj elstara kiel maristo, kiel instruisto, kiel homo.

En la monografio aŭ memorlibro "125. obljetnica pomorskog školstva u Bakru", kiu aperis en la jaro 1974, sur la paĝo 83 oni povas legi:

"Politika kuraĝo, scienca spirito, sento pri aparteno al la propra popolo kaj aparte al la regiono de Bakar, forte ligitaj ornamas la virojn kiuj anĝe kaj honore gvidas la lernejojn kaj edukas novajn maristajn generaciojn... Iuj el ili per sia ekzemplo estiĝis modeloj... Bakar, gasteme malfermita konko, estas ekirpunkto kaj gardanto de la kroata maristara tradicio, muzeo pri memorado de la homaj valoroj kaj ilia ĉiam viva fonto."

Pri Branko Širolo oni trovas ĉi tiun frazon:

"Antaŭ nelonge mortis la laste jugoslavia komandanto de transoceanaj velŝipoj - Branko Širolo, la homo kiu en siaj taglibroj postlasis literaturan dokumenton pri sama vivo de maristoj."

Branko Širolo naskiĝis en Kraljin la 4-an de februaro 1894, kaj mortis en Rijeka en la jaro 1974. Ĝuste en tia jaro en kiu aperis memorlibro de la Naŭtiko.

Li finis (maturiĝis) la Maristan lernejon en Bakar en la lerneja jaro 1900/1901. (En tiu jaro maturiĝis entute ok naŭtikaj lernantoj.)

En la jaro 1908, li estiĝis ŝipestro de "Contessa Hilda". Tio li estis la plej juna ŝipestro en la Aŭstro-Hungara Monarkio, kaj "Contessa Hilda" estis la plej granda velŝipo en la maristaro de la Aŭstro-Hungara Monarkio, unu el la plej grandaj velŝipoj en la mondo en tiu tempo.

Per "Contessa Hilda" li ĉirkaŭnavigis la mondon, pasante preter Horna Kabo (la plej sudpunkto de Suda Ameriko), preter tiu plej danĝera punkto en la tuta ocesnaro, preter tiu punkto kie blovegas akraj ventegoj tre ofte. Ekzistas en Londono unu Societo de Kabohornanoj, nome de tiuj gloraĵ maristoj kiuj tranavigis Hornan Kabon velŝipe. Branko Ŝirola estis membro de tiu honora societo. Malmultaj povis diri pri ŝi Kabohornano. Sed, ekzistas ankaŭ unu pli alta rango, por la elito inter Kabohornanoj: Maĵstro albatroso ("Master albatros"). Tiun titolon ricevas nur tiu Kabohornano kiu tranavigis Hornan Kabon en ambaŭ direktoj: navigante velŝipe de okcidento orienten kaj inverse de oriento okcidenten. (En la akvon de Horna Kabo nur la albatrosoj senlace obstine spitas al ventegoj.) Branko Ŝirola akiris ankaŭ tiun titolon. Li dufoje ĉirkaŭnavigis mondon preter Horna Kabo, de oriento okcidenten kaj de okcidento orienten.

De la jaro 1920, ĝis 1924, li estis instruisto pri la angle lingvo en la Naŭtiko Bakar. Poste li estis Bipeganto de la entrepreno "Oceanica" en Las Palmas (Kanariaj Insuloj) ĉ. 15 jaroj. Post la dua mondmilito li laboris en Rijeka ĉe "Jadroagent".

Branko Ŝirola, krom la kroat-serban lingvon, bone parolis anglan, italan, francan kaj hispanan, kaj sufiĉe bone germanan kaj rusan. Elstara naviganto-poligloto.

Dufoje li, kaj lia familio, perdis la tutan sian havaĵon. Unue post la translokiĝo el Bakar al Las Palmas (ĉio kion ili lasis en Bakar perdiĝis dum ventegaj jaroj) kaj due post ilia perforte forlaso de Las Palmas al Londono, ĉar komencis la hispana milito. (Kanaria Insularo apartenas al Hispanio.) Dum la dua mondmilito perdiĝis ilia havaĵo lasita en Las Palmas.

Mirinda rakonto kaj atesto de unu alia Kaphornano

Kiam mi decidis komenci kolekti materialon por historion de la Esperanto-movado en la regiono Rijeka, el ĉiuj jugoslaviaj "kaphornanoj" vivis ankoraŭ nur kapitano Ivo Ĉargonja. Tio estis en la jaro 1981. Al la hejmo de kaphornano kapitano Ivo Ĉargonja mi en Matulji venis la 27-an de novembro. Tiam li havis jam sesdekseks jaroj. Li naskiĝis la 10-an de aŭgusto 1885, en Tizani.

Jam antaŭe mi estis ekscitita pendante ke mi intervjuos tiel valoran homon, plenan je Esperanto, iaman lernanton de la sama Naŭtiko kiun vizitadis Branko Ŝirola, poste la naviganton sur la "Contessa Hilda", poste la kapitanon kiu bone konis iamaj vivkondiĉoj en Bakar kaj kiu verŝajne, povus doni ion ajn interesan pri kapitano Branko Ŝirola.

Mi ne trompiĝis. Estis interesege aŭskulti la unikajn vivajn atestanton pri la okazaĵoj en la Naŭtiko en Bakar komence de la jarcento. Tiu intervjuo estis por mi tre favora ŝanco. Deksep monatoj pli poste, la 1-an de majo 1983, en la aĝo de 98 jaroj Ivo Ĉargonja mortis en Matulji.

Ne estinte ankoraŭ kapitano, sed kiel juna maristo en la jaro 1906, Ivo Ĉargonja onŝipigis sur la fiera trimasta barko de la posedanto el Loŝinj, "Contessa Hilda", per kiu li trifoje ĉirkaŭnavigis Hornan Kabon. Li tre bone konis kapitanon Branko Ŝirola.

-Komence de tiu-ĉi jarcento - rakontis Ivo Ĉargonja- oni bone sciis en Bakar pri Esperanto, precipe en la Marista lernejo.

Mi mirigis. Ĉu vere, nur 13 jaroj post la eldono de la Unua libro de Zamenhof, eĉ kvin jaroj antaŭ la unua Universala Kongreso (1905, en Boulogne sur Mer) la Bakaranoj sciis pri Esperanto?

-Jes. Eĉ oni povus diri ke la lernantoj de la Naŭtiko tiam estis dividitaj en du malgolegaj grupoj koncernante Esperanton. La malplimulto, grupeto konsistanta el kelkaj kvar-kvin maturantoj el la lernejo jaro 1900/01, de grupeto de junaj entuziasmuloj vigle propagandis Internacian Lingvon kaj fervore levadis demandojn pri enkonduko de la instruado de Esperanto. La aliaj naŭtikanoj scivolems sed pasive atendadis kio naskiĝos el tia stato kaj kiel kondukos la lerneja estraro.

Kiu estis la plej fervora batalanto por Esperanto?

-En la unuan grupo plej multe ellevegiis Ĥerljinano Branko Ŝirola, tiam deksee-jaraĝa. kaj kun li Bakarano Dragutin (Karlo) Mikuličić, tiam dekok-jaraĝa.

Kion tiam opiniis pri ili iliaj kolegoj.

-Ni opiniis tiam - vige respondas Ĉargonja - ke ili estis iomete frenezetaj. Ni opiniis ke ili volis fari la urbeton Bakar kun ĝiaj 2000 enloĝantoj interesan por la tuta mondo.

Ĉu ili montris iujn aktivecojn?

-Ili korespondis Esperante kun diversaj Eŭropanoj. Ili postulis de lerneja aŭtoritatoj permeson por instruado de Internacia Lingvo en Naŭtiko. Ili asertis ke Esperanto estas la ĝusta lingvo por maristoj, necesa al maristoj ĉar la maristoj veturas tra la tuta mondo.

Kaj kiel li sukcesis?

-Kvankam ili estis tre ambiciaj, ili ne sukcesis. La lernejo forĵetis ilian postulon. Ĝi decidis ke tio ne apartenas al la instruado de naŭtikaj studobjektoj.

Dankon al kapitano Ĉargonja por lia atesto. Pridensu, antaŭ 85 jaroj la meturantoj el Bakar korespondis Esperante! Ili ne venkis en tiama ilia batalo, sed tamen la batalo ne estis vana. Poste Branko Ŝirola semis novajn semojn.

La maristoj kaj Esperanto

Sub la titolo "Ledarski kabinet" ni jam aperigis en "Heliko" belan rakonton pri iu Pilepić, sendube Rijekano. Mies filino Magda esperantiĝis jam el la jaro 1889. - du jaroj post la eldono de la Unua Libro. Tiu Pilepić estis maristo, kapitano, rivernaviganto, ŝipestro ĉe Danubo navigado. Konata estas ankaŭ la mirinda Esperanta epizodo sur la unua mondmilito: Esperanto-kursoj sur batalŝipo kaj ĝiaj protagonistoj Rijekano Ŝikić kaj Triestano Zucco. Pli poste ni revenu al la demando kiel ĝuste maristoj havis apartan intereson por Internacian Lingvon, kaj kiel, ekzemple, en Bakar? Sed, nun ni diru kelkajn vortojn pri la poresperanta agado de Branko Ŝirola.

En la "Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio" far Marinko Gjiivoje pri la jaro 1922, oni diras, interalie: "Fondiĝis novaj societoj kaj grupoj: la 20-an de aŭgusto 1922 Esperanto-societo en Sušak... kaj grupoj en: Bakar (Branko Ŝirola)..."

En la libro "Problem međunarodnog jezika i Esperanto" far dro Ĉofil Velnić, Lubrovnik, 1924, aŭtoro mencias "sponena vrijednu gospodu, vatrene pristaše zaslužne da se Esperanto počeo kod nas sve više širiti" (menciindaj valoraj sinjoroj, ardaĵ adeptoj, meritaĵ por la pli kaj pli granda disvastigado de Esperanto en nia lando). Inter tiuj personoj troviĝas la nomo de Branko Ŝirola. Entute estis 23 nomoj el la tuta Jugoslavio. Do, Branko Ŝirola tiam estis sur la pinto de la jugoslavie E-movado.

Tiutempe li estis tre agema esperantisto. Li gvidis kursojn en Bakar. Li estis delegito de UEA (Universala Esperanto Asocio). Tiuj estis la jaroj kiam kapitano Ŝirola instruis en la Naŭtiko. Li ankaŭ skribis pri Esperanto.

Mi posedas malgrandan notkajereton en kiu troviĝas du priesperantaj notoj el la jaroj 1923 kaj 1924. Unu noto kraleone skribita de Branko Ŝirola tekstas:

"Sro Dro Mi sendas al Vi dudek dinarojn por dudek "Ĝlosilojn". Mi transdonis la dek viajn gramatikajn al likristo Antić el kiuj li jam vendis du ekzemplerojn, sed nunon li kutimas doni al mi pli malfrue, je la jarfino, B.Ŝirola"

La dua noto estas skribita sub la titolo "Esperantaĵoj" kaj cetere:

"1. Oficiala Jarlibro, 2. Vocab. Esp-Ital., 3. Nevoj de la homo, 4. Dua ekzerco, 5. Statuto de UEA., 6. La unismo, 7. Međun. jezik Esperanto, 8. Praktična obuka u Esperantu, 9. Međunar. jez. Esperanto, Gramatika Maruzzi, 10. Fundamenta Gramatiko de Esp., 11. Du sudslavaĵ popolkantoj, 12. La preĝareto, 13. Oficiala Bulteno, 14. Letero de U.E.A., 15. Internac. Poire de Reichenberg, 16. Esperanto Katalog.

17. Corso di lingua Esperanto, 18. Ĉe la koro de Eŭropo, 19. La ekonomiaj fortoj en Finnlando, 20. Revuo "Esperanto", 21. Orange-posto, 22. La formortinta amiko, 23. Esperanta Abelo, 24. Katalogo de produktaĵoj, 25. La Leipzig-a Foiro, 26. Export Esperantist, 27. Bizancio, 28. Literetura mondo, 29. Rijeĉnik Rev. Esp."

El tiuj du notoj evidenta estas korespondado inter Ŝirola kaj dro Maruzzi kaj por mi konservite interesa transigado de esperantaĵoj el tiu tempo ĉe kapitano en Bakar. Bedaŭrinde, mi ne povis trovi ion pli gravan ĉe la familio. La filino de kapitano Ŝirola Božica rakontis al mi pri ilia dufoja perdo de libroj, dokumentoj, fotoj kaj aliaj paperoj. En Povijesni i pomorski muzej en Rijeka troviĝas nur du taglibroj de Ŝirola el la jaro 1903, kaj du taglibroj el 1908, kaj 1909. jaroj.

Branko Ŝirola estas aŭtoro de amplekse artikolo sub la titolo "Pomerci i Esperanto" (Maristoj kaj Esperanto) publikigita en la revuo de jugoslaviaj maristoj "Jugoslavenski pomorac" (Jugoslavia maristo) en la numero de la 1-a de aprilo 1924.

La artikolo estas dividita en kelkaj partoj. Unue ĝi traktas pri la praktita uzo de Esperanto, poste ĝi priskribas la ekeston de Esperanto, la organizaĵoj de esperantistoj, Esperantan gramatikon, kaj, fine, Esperanton en Jugoslavio.

Ci tiu ni almenaŭ kelkajn frazojn el tiu longa, bona artikolo. Skribinte pri la praktika uzo de Esperanto, Ŝirola mencias interalie: "Lani je u talijanskim pomorskim akademijama uveden esperantski jezik kao neobligatan predmet..." (Pasintjare en italaj maristaj akademioj oni enkondukis Esperanton kiel fakultativan studobjekton). Parolante pri Zamenhof, Ŝirola skribis: "... pisac ovog članka ove godine je na obljetnicu Zamenhofova rođenja (već treći put) održao predavanje dacime pomorske akademije u Bakru." (aŭtoro de tiu ĉi artikolo ĉi jare je la naskiĝtagreveno de Zamenhof /jam la trian fojon/ prelegis al la lernantoj de la Marista akademio en Bakar.).

En la parto kie li priskribas Esperanton en Jugoslavio li konstatas ke la Ligo de jugoslaviaj esperantistoj havas nil membrojn, ke la unua kongreso de jugoslaviaj esperantistoj okazis en Zagreb en la jaro 1923, kaj ke tiam en la nomo de la Klubo de jugoslaviaj maristoj la kongreson salutis Rudolf Grnić, kluba sekretario.

Eble la plej interesa el ĉio estas la fina noto. Mi citas: "Ovaj je članak u prvom redu namijenjen našim svijesnim mladim pomorcima... Na drugom mjestu namijenjen je našem ministru prosvjete i vjere, da bi se ugledao u svog talijanskog kolegu, koji je lani uveo Esperanto u pomorske akademije kao neobligatan predmet."

Kio en Bakar post kapitano Ŝirola?

En la jaroj 1926, kaj 1927, denove aperis unu profesoro esperantisto en la Kaŭtiko en Bakar. Tiu estis Milivoj Mihajlović, naskita la 27-an de januaro 1896, en Krnješevci, distrikto Zemon. Li estis profesoro pri matematiko. Li parolis italan, ŝeĥan, germanan, francaĵ kaj Esperanto. Tio estas skribite en la metrikula libro de Kaŭtiko en Bakar.

Profesoro Mihajlović poste venis al Sušak. Li aktivis kiel esperantisto en Bakar kaj en Rijeka. En la jaro 1964, li estis LKK-ano de la 13-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj en Rijeka. En nia societa biblioteko "A.Š. Turković" ni posedas kelkajn esperantaj libroj donacitaj de profesoro Mihajlović.

En la "Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj" menciita estas iu Mihajlović per tiuj ĉi vortoj: "En "Konkordo" 3/1922 sur la paĝo 4 estas notite: "Bakar. Estis organizita kurso de Esperanto Mihajlović en Ŝarljevo ĉe la stacidomo, kiun multaj partoprenis. Tre vigle propagando de profesoro de la Marista lernejo Branko Ŝirola, delegito de UEA."

Ĝis nun mi nenion pli eksciis pri tiu Mihajlović el la tempo de Ŝirola.

Inter la jaroj 1930-1940 vivis en Bakar kaj gvidis E-kurson en Bakar kaj en Selce Mirko

(Emeriko) Schönberger, inĝeniero de elekto. Li naskiĝis en la jaro 1906. en Novi Sad. Li perdis la 6-an de januaro 1942. en Ĉabalj. Marinko Gjiwoje skribis ke en la jaro 1939. lian Cseh-metodan kurson en Bakar vizitis 69 personoj. parte urbanoj. parte studentoj de la Marista kaj Komerca akademioj.

Kial ĝuste en Bakar?

Por la fino mi lasis eblan respondon al la demando: "Kial ĝuste en Bakar naskiĝis tiel frue amo kaj intereso por la Internacia Lingvo?"

En la jam kelkaj fojoj citite kaj menciita memorlibro de la Neŭtiko de Bakar sur la paĝo 31 oni legas:

"La oficiala lingvo en la maristaro de la Austro-Hungara Monarkio estis itala. La fakajn ekzamenojn por la profesioj en maristaro oni faris itale, ĉar la instruada lingvo en la maristaj lernejoj estis itala. La vera kialo por tio estis: se en nia marbordo kaj sur la ŝipoj oni ne aŭdas germanan kaj hungaran, tial oni aŭdu italan, nur ne kroatan."

En tiaj kondiĉoj multaj niaj maristoj. navigante tra la maroj de la mondo, scipovis uzi plurajn fremdajn lingvojn. sed ili tamen ofte konvinkiĝis ke la interkomprenado ne estas ĉiam facila. Ĉar ne-niu povas ellerni ĉiujn lingvojn. Sperto sur la propra haŭto pri la Babelo kaŭzis la ideon pri Internacia Lingvo.

Rado Škalamera

Por la sekvantaĵoj mi ellasis la kuriozaĵojn pri Nikoloa Hohllov en Bakar en la jaro 1922. (Rotkviĉ lin venigis al Zagreb)

poezio

Vjekoslav Morankić

Pensigo

Kial vi homoj preterpasas mutaj.
Muto ĉirkaŭiĝas la mondon brue.
Brue pli granda. kaj viv rapide,
Preskaŭ ĝojiga estas prosper'.

Animo etiĝas sensenta estiĝas
Post ĝojo senfina, amuzo lirika
Silento veniĝas, soleco estiĝas
Sensenta malplena anim'.

Ĉu estas vi homoj
mensogo aŭ ver'?

Ĉu estas vi homoj
mutaj de prosper'?

FESTIVALO DE KROATIA ESPERANTA KULTURO EN KUMROVEC



Vendrede tagmeze en la stacidomo de Rijeka adiaŭis nin gepatroj kaj geamikoj, kvankam la foresto daŭros nur unu diurno. Dum la vojaĝo ĉiuj estis gajaĵ kaj kantis, ludis, babiladis, kuradis en la vagono. Kunveturis 25 gelernantoj kaj du iliaj gvidantoj - muzikinstruistino Mirjana Žužić kaj aŭtoro de tiuj ĉi impresoj.

La vespero en Kumrovec, kiam ni alveturis, estis trankvila kaj freŝiga. Ni tre ĝuis duonhoran iradon ĝis la hotelo. Ho, kiel ĝojis niaj gejunuloj restadi en tiel bela kaj luksa hotelo! Ili eĉ povis ekdormi, kaj ĝis la noktomezo daŭris interŝanĝo de impresoj.

Venontan matenon alvenis plimulto da partoprenantoj, kaj komencis la Festivalo de esperanta kulturo en kadro de Junulara kunveno. En la vilaĝo oni povis vidi multajn portafiŝojn okaze de tiu ĉi evento, sed neniu signo pri ĉeesto de esperantistoj!


Festivalo okazis en gimnastikejo de elementa lernejo kun prokrasto de pli ol unu horo. Inter alie ni atendis ke oni alportu la fortepianon. Estis multajn homojn, sed segoj ne sufiĉis, kaj duono da spektantoj devis stari.

Tamen, ĥoro de lernejo "V. Gortan" malfermis la programon per "La Espero". Daŭris iom da tempo por atingi silenton en la salono, ĉar en la antaŭo aliaj grupoj sin preparis kaj babiladis.

Certe ke tio ĝenis niaj junaj kantistoj, sed nur en la komencaj du kanzonoj. Je la fino de ilia programparto estis tre laŭta kaj elkora aplaudo.

Ĉi jare nombro de partoprenantoj kaj spektanoj estis pli granda ol tiu de antaŭaj jaroj. Ankaŭ la kvalito estis pli bona. Oni bezonas nur iom pli zorge antaŭprepari kaj organizadi la eventon. Ĉu partopreno de Rijekanoj fariĝos tradicia? Ni esperu!

S. Vitolović



Ĉlanovi Malog zbora koji su sudjelovali na smotri u Kumrovcu 1984. :

Stoje s lijeva na desno: Iva Dušević, Gordana Dokmanović, Kristina Matešić, Ksenija Šegota, Nataša Rončević, Srna Hercog, Đorđe Obradović, Ivana Kajdi.

Ĉuĉe s lijeva na desno: Maja Baković, Karmen Franki, Kristina Dumić, Nataša Brašnić, Dijana Perhat, Ljiljana Hrzić. Vedran Rasol, Hana Mahmutefendić.

Zborovoda: prof. Mirjana Žužić

La kunveno de esperantistoj

En monato majo ĉiujare kunvenas en Kumrovec junaj esperantistoj el la tute lando. Ĉu en jaro estas pli bele monato ol floriga majo? Ĉu iu sjan lingvo kunligas pli bone la homojn ol esperanto, lingvo de paco kaj amikeco? Kiel kentas junaj esperantistoj - ĉu vi aŭdis? Jen mi kondukas vin momente en ĉiujara kunveno de esperantistoj.

Kumrovec. Estas printempo, suna tago. Amaso de homoj, ĝojemaj kaj gajaj, kun vizaĝoj ruĝetaj. Oni babiledas, interŝengas la adresojn. Multaj el ili portas la verdan steleton. Kej, kiel bele kantis junaj esperantistoj! Tion mi ne povas priskribi perole. Mi ne povas prezenti al vi kiel belsonas la kanto pri amikoj, aŭ kara, subtila "Denkon".

Iam, kiam por vi la esperantista ĥoro kantas ĝin, vi scios kion mi volis diri.

Rončević Metaša, v^o klaso
Elementa lernejo "Vladimir Gortan"

Rijeka



Sukcesplenaj seminarioj

Fundamento por starigi pedagogian sektion,
alivorte solidan bazon por la plua disva-
stigo de Esperanto, precipe en lernejoj

En ĉi-jara agadprogramo de la Esperanta societo "A.Ŝ. Turković" la seminarioj por instruistoj pri Esperanto okupas tre gravan lokon. Du seminarioj sukcese plenumiĝis. Tiel malfermiĝis la ebleco fondi pedagogian sektion kaj sekve iniciati novajn aktivecojn en novaj medioj, precipe en lernejoj.

Ĉiu el la du seminarioj konsistis el du partoj. La unua okazis la 10-an, 11-an kaj 12-an de majo. Tiun komencon de la unua seminario gvidis Ivica Špoljarec el IKS laŭ la zagreba metodo. Partoprenis 9 geinstruistoj (7 virinoj kaj du viroj) el elementaj lernejoj el Rijeka kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

La dua parto de la unua seminario okazis en la ejoj de la Hejmo de sindikatoj "Franjo Belulović" la 24-an, 25-an kaj 26-an de majo. La ekzamenoj okazis la 27-an de majo en la salono de hotelo "Kontinental". Tiu parto de la seminario estis tre interesa kaj eksterordinara, ĉar la partoprenintoj estis miksitaj: el Aŭ-

strujo 17 gastoj (13 Aŭstruoj, 3 Anglinoj, studentinoj de germana lingvo, unu Novjorkano,

profesoro de la angla ĉe la universitato en Graz) kaj se-

minarianoj de la

unua parto kaj gekursanoj de la societa

Seminarij-za nastavniko esperanta

● Temoj za osnivanje pedagoške sekcije pri Esperantskom društvu «A. Š. Turković» i daljnje širenje esperanta sebnio u školama

RJEKA, 18. srpnja Seminar za nastavniko esperanta zauzimaju istaknuto mjesto u ovogodišnjem radu Esperantskog društva «Aleksandar S. Turković». Dva takva seminaru uspješno su završena. Te osnuje pedagoška sekcija da se pri inicirati nove aktivnosti. Dva bi bio

rović i Sanja Vukmirović, Pohorje, Anđana Jovanović, Sanja u. Iva Matijašević, Sanja u. će dobiti su...

kurso gvidita far Sanja Bokulić.

Komence, ce la malfermo tiun parton de la seminario gvidis Zlatko Tišljar, kaj poste la gvidon transprenis prof. Slobodan Vitolović, Sanja Bokulić, Anja Hurčak kaj Karl Hirmann, mezlerneja instruisto, gvidanto de la E-grupo en Graz (Ehlergasse 14, A 900 Graz, tel. 0316 328-633).

Al la ekzamenoj aliĝis 22 personoj (6 Aŭstroj, 3 Anglinoj, 1 Usonano kaj 12 Rijekanoj). La plej junaj Aŭstroj ne aliĝis al la ekzamenoj. La ekzamenoj konsistis el tri partoj: a) plenumado de mankintaj vortoj en la donita Esperanta teksto, b) traduko de nacilingva teksto Esperanten, kaj c) kvar-minuta Esperanta parolo je difinita temo. Ĉiuj faris sukcese la ekzamenon kaj ili ricevos oficialan atestiloj de KEL (Kroatia E-Ligo).

Jen iliaj nomoj:

Irena Barković, Jasna Barković, Emina Gaš, Jagoda Halužan, Arijana Jovanović, Aleksandra Matić, Delfina Matijašević, Ksenija Marinković, Jugoslava Popović, Sanja Stanojević, Jasna Vukmirović, Sanja Vukmirović. Ses Aŭstroj: Alex Brandl, Wolfgang Brumetz, Ruth Neumeister, Richard Persché, Bernd Weiler kaj Niki Zerdahelyi. Tri Anglinoj: Carolin Clark, Rebecca Coggins kaj Brigitte Pither. Unu Usonano: Frank Newman.

Laŭdon ricevis Arijana Jovanović, Sanja Vukmirović, Delfina Matijašević, Jasna Vukmirović, Alex Brandl, Rebecca Coggins, kaj Bernd Weiler.

La dimanĉon, la 26-an de majo la societo "A.Š. Turković" organizis por ĉiuj partoprenintoj de la seminario ekskurson aŭtobuse: Delta-la kastelo Trsat-Bakar- la Tito-ponto -Kastav-motelo "Panorama" super Opatija. Dum la ekskurso mi prelegis tri foje pri la vidindaĵoj, pri la historio kaj pri la nuno de vizititaj lokoj kaj de la regiono Rijeka.

En "Novi list" mi publikigis informon sub titolo: "Seminar međunarodnog jezika - Austrijanci u Rijeci po zagrebačkoj metodi".

Radio Rijeka intervjuis en la viva elsendo Anglinon Brigitte Pither, la gvidanton de la aŭstra grupo prof. Karl Hirmann direktoron de IKS Zlatko Tišljar kaj sekretarion de "A.Š." Valter Šverko. Por la elsendo "Bura" Dražen Vitolović surbendigis interparolon kun Anglino Rebecca Coggins kaj Aŭstro Richard Persché el Graz.

La gastoj el Aŭstrujo foriris el Rijeka trajne 28-an de majo hejmen. Ĉe la adiaŭsamideanoj Karl Hirmann kaj Slobodan Vitolović interŝanĝis societajn memordonacojn. Ĉio pasis en hela etoso kaj tre sukcese. Utila sperto, sukcesplena seminario, sami-

deaneca renkontiĝo.

La dua seminario estis eĉ pli grava laŭ la konsisto de ĝia anaro. La gvidanto estis prof. Slobodan Vitolović. La unuan parton vizitadis nur du personoj, sed verŝajne tre gravaj, du profesorinoj pri kroat-serba lingvo en CUO KUOIK (Centro pri fakdirektita instruado por kadroj en edukado kaj kulturo) Rajna Maršanić kaj Dušanka Starčević. Tiu parto okazis la 31-an de majo kaj 1-an kaj 2-an de junio.

Por la duan parton de la dua seminario anonciĝis 14 personoj, sed vere la 1-an, 2-an kaj 3-an de julio ĉeestis ĉi tiuj dek personoj:

Ana Biočić, pedagogino ĉe OŜ V.Gortan, Rajka Jurčenko, ekonomistino en Jurjevo, Katica Jurčić, instruistino OŜ S. St. Kranjčević en Senj, Rajna Maršanić, prof. CUO KUOIK, Aleksandra Matić, lernantino CUO KUZ M.Lenac, Nada Starčević, instruistino OŜ V.Gortan, PŠ Draga, Dušanka Starčević, prof. CUOKUOIK, Rene Sušanj, Zorka Sušanj, pedagogino ĉe Centar za Odgoj, kaj Doria Verbič, prof. pri angla kaj itala ĉe OŜ Rudolf Tomšić.

Bedaŭrinde ne povis partopreni Miloš Miličević, studento pri psikologio, Jasna Karić, prof. pri angla kaj franca ĉe OŜ Nikola Tesla, Branka Plišić, prof. pri germana ĉe CUO EUMIK, Marija Trbović, instruistino OŜ Podmurvice, kaj Stanislav Sekulić, reklankolektisto.

La lastan tagon de la seminario mi prelegis pri "Kion plu kaj kiel antaŭen", pri tri eblaj interesdirektoj: 1/ aktiva partoprenado en la Esperanto-movado, 2/ profundigado de la lingvoscio, (interlingvistiko kaj esperantologio), kaj 3/ studo kaj ĝuo de la Esperanta literaturo (beletro kaj alia).

Kroatia Esperanto-Ligo financis seminariojn per 50.000 dinaroj.

Esperantisto profesoro Božidar Pasarić, direktoro de Instituto por kleriga-pedagogia servo de la Komunumaroj Gospić kaj Rijeka vigle interesiĝas pri la rezultoj de seminarioj. Ĉe Pedagogia fakultato en Rijeka profesorino Škunca esprimis deziron lerni Esperanton.

Konklude, oni povus diri ke la E-societo "AŜT" faris fortan paŝon antaŭen. Ni esperu fruktodonajn rezultojn en la baldaŭa estonteco. Eble oni povas esperi ke ankaŭ en Rijeka baldaŭ fondiĝos studenta organizo de Esperantistoj.

Rado Škalamer



Spomenka ricevis altegan klasifikon

Bedaŭrinde en Rijekan ankoraŭ ne venis unu tre valora esperantaĵo, la nova libro kies aŭtoro estas Spomenka Štimec. La beletra kritiko donis al ŝia verko altegan

ŠTIMEC SPOMENKA: na. klasifikon.

Ŝi naskiĝis la 4-an de januaro 1927 en Čreškovica ĉe Čakovec. Ŝi lernejis en Varajdin en Zagreb, kie ŝi ankaŭ naskiĝis en 1972 pri franca lingvoj. Ŝi laboras en Internacio de Esperanto, profesie

Temas pri la romano "Ombro sur interna pejzaĝo", eldonita pasintjare (1984) de Edistudio, 140 paĝoj. En la revuo "Kancerkliniko", numero 33 (jan, feb, mar. 1985) la tuta paĝo 22 estas plenumita per la recenzo pri tiu libro far Georges Lagrange. La recenzo abundas per superlativoj laŭdantaj la verkon de Spomenka Štimec. Jen kelkaj citaĵojn:

-Kaj jen alvenas la romano de Spomenka Štimec: "Ombro sur interna pejzaĝo" kaj mi opinias, ke ĝi estas io treege grava.

-Spomenka estas vera esperantistino, iu por kiu esperanto estas ne nur lingvo de la solenaj kongresparoladoj, aŭ de la vesperaj kluboj, sed ankaŭ la lingvo, dum oni lavas puloveron, en lavabo, la lingvo de enlitaj flustroj. Kaj tial... Spomenka, aŭtenta esperantistino verkis en rimarkinda esperanto.

-Ŝia esperantismo ne estas ŝafbleka verdismo sed io profunde sentata, io varme intima.

-Oni ankaŭ sentas... nu, ke tiu maldika libro certe same tiel gravos en la esperanta literaturo kiel siatempe "La Infana Raso" aŭ "La Granda Kaldrono" en aliaj stilregionoj.

Mi humile opinias ke pli grandan laŭdon oni ne eblas esprimi ol tiel kompari la verkon de Spomenka kun la mejloŝtona beletra, celebra, Esperanta verko de Auld.

Gratulon al Spomenka!

La recenzo de Lagrange ekscitas nian intereson kaj scivolecon ekkoni plej baldaŭ tiun kuriozan legaĵon.

Rado Ŝkalamera

OFICIALE ENSKRIBITAJ EN LERNEJAJ ATESTOJ

LA UNUJAJ DEK NOTOJ

Pri fakultativa instruado de Esperanto en la mezlernejo Centar de kadrove u kulturali i obrazovanju en Rijeka mi donis direktoro de tiu ĉi lernejo mg Karlo Marle skribitan raporton. La direktoro promesis publikigi tiun raporton en la lerneja jarlibro. Mi akceptis antaŭ la proponon ke tiu lernejo malfermu en sia biblioteko Esperantan fakon. La direktoro proponis ke mi kontaktu kun la bibliotekistino por konsili kiujn librojn (lernolibrojn, vortarojn kaj beletrajn librojn) oni havigu kaj kiujn gazetojn aŭ revuojn oni abonu.

Antaŭ ol reprodukti la raporton, estu menciitaj ankoraŭ du faktoj. En la pasinta lerneja jaro du lernantinoj de tiu ĉi mezlernejo, Barbara Stanković kaj Branislava Subotić, partoprenis en Kuarovec en la aranĝo pri Esperanta kulturo kun recitaĵoj de poemoj de ĉaĥavej poetoj en Esperanto. Ĉi-jare en Furdevac tri lernantinoj de tiu lernejo, Nensi Njegovan, Ivona Znaor kaj Alekka Žic, partoprenis en la Kvizo pri nealiancitate kaj skiris la duan pozicion kaj la duan premion.

Jen la raporto:

Je la fino de la lerneja jaro 1984/85 en la "indeksojn" de dek lernantinoj de la mezlernejo Centro por la kadroj en instruado kaj kulturo (CZKUOIK) mi enskribis la noton bonege el Esperanto. Verŝajne tio estas unua fojo ke oni enskribas la noton el Internacia Lingvo en la CZKUOIK.

Dum la lerneja jaro 1984/85 la studobjekto Esperanto estis prelegata dufoje semajne po unu horo, merkrede kaj ĵaude ek 13.¹⁵ ĝis 14 horoj. Okazis entute 56 instruohoroj. Oni prilaboris lernoprogramon por la elementa grado (A) de la scio de internacia lingvo Esperanto laŭ la tiel nomata Zagreba metodo. (Aŭtoro de la lernolibro estas elstaraj esperantistoj kaj spertaj prelegantoj de Esperanto Roger Imbert, Tibor Sekelj, Ivica Špoljarec, Soomenka Štimec kaj Zljetko Tišljar.) La lernantinoj kiuj gajnis la noton bonege skiris elementan parolkapablon Esperantan kaj ili konstatis kun la bazaj scioj pri la Esperanta kulturo.

La notojn ricevis ĉi tiuj lernantinoj: abiturientinoj Vanja Mušnjač (IV K2), Barbara Stanković (IV INDOK) kaj Branislava Subotić (IV INDOK) lernantinoj de la I K3 klase Nensi Njegovan, Ivona Znaor kaj Alekka Žic, el la klase I K1 Maja Bolonić, el la klase II 8 Zora Šebec kaj Sanja Zapoltnik, kaj el la III KKD Jasna Vukmirović.

La unua studhoro en la lerneja jaro 1984/85 okazis la 25-an de Oktobro kaj tiam komencis lerni Esperanton 33 gelernantoj (ok el unua klase, dekunu el la dua, tri el la tria kaj dekunu el la kvara klase). Ili estis ne nur el diversaj klasoj, sed ankaŭ el diversaj fakoj kaj el diversaj sekcioj. Tiel ofte oni renkontadis embaresoj. Tiuj lernantoj devis foresti ĉar ili samtempe havis lernoboron de la deviga studobjekto. Iom post iom la komenca numero malgrandiĝis, precipe dum la dua semestro. Elde 33 nur dek sukcese venis ĝis la fino.

Fakultativa instruado de Esperanto en ĉi tiu lernejo komencis jam en la lerneja jaro 1983/84, sed nur post la 28-a de Marto 1984. Oni povas diri ke tiu jaro estis eksperimenta kaj la jaro de spertoakirado. Por lerni Esperanton tiam sin anoncis 53 gelernantoj el naŭ diversaj fakoj. En 14 horoj de lernado ili akiris la problemon de internacia lingvo kaj ili akiris la elementajn nociojn pri Esperanto. Ili tiel satigis scivolon vekitan ĉe ili per la ekspozicio de la Esperanta libro, okazinta en ĉi tiu lernejo en aprilo 1984.

Esperanto-societo "A.Š. Turković" en Rijeka okazigis ekde 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 1985, seminarion pri internacia lingvo por instruistoj. La dua parto de la seminario okazis en la dua parto de junio. En la seminario partoprenis du profesorinoj el CZKUOIK Dužanka Starčević kaj Rajna Marčanić, prelegantinoj de la kroatsa lingvo. En la sekvanta lerneja jaro ili du povus komenci gvidi la fakultativan instruadon en CZKUOIK. Verŝajne tiam oni povos pli bone organizi fakultativan instruadon. Verŝajne, laŭ akiritaj spertoj, oni organizu tiel ke Esperanto-klason vizitadu lernantoj de la sama jaraĝo, de la sama fakoj, por ke ili ĉiuj povu certe samtempe venadi al la esperantaj lernohoroj.

Dankon al la lernejo, ĉar ĝi ebligis kaj subtenis Esperanto-instruadon. Eble oni povus fari paŝon antaŭen. Por ke oni ebligu akiradon de pli ampleksaj sciojn al la lernantoj montrantaj intereson por la problemaro de internacia interkomprenado en moderna mondo, por lernado de internacia lingvo kaj por interkonatiĝo kun la progresema novaĵo kaj ke kulturo Esperanta - la lernejo eble povus en sia biblioteko malfermi fakon de Esperanta libro, havigante lernolibrojn kaj alian literaturon en internacia lingvo. Rijeka, la 11-an de junio.

Rado Škalamera

NIAJ JUBILEANTOJ

Meho Jakupović 70-jara



La 11-an junio 1985 Meho Jakupović plenumis 70 jarojn. Ni kore gratulas lian jubileon. "Heliko" esprimas al li multajn bondezirojn.

Meho en ĉi tiu jaro emeritiĝis, sed tamen li diligente daŭras en laboro. Kiel esperantisto li travivis jam ĉirkaŭ 53 jarojn. Por Esperantujo li ne emeritiĝis, ĉar li restas pluen unu el la plej aktivaj esperantistoj en la regiono Rijeka.

Ĉi tie kaj nun ni ne havas intencon skribi longepri Meho. Tion ni faros abunde kaj amplekse en alia okazo; tio estas en la libro pri la historio de Esperanto-movado en nia regiono. Sen Meho, oni ne povus serioze rakonti la plenan historion de nia societo en la postmilita tempo.

Ĉi tie ni nur memorigu niajn legantojn ke Meho estis famkonata kursgvidanto laŭ la Cseh-metodo, ke li estas ne nur Esperanta patro al multaj jugoslaviaj esperantistoj, sed li estas ankaŭ Esperanta avo al iuj eminentaj hodiaŭaj esperantistoj tra la mondo. Meho estas duviviva membro de UEA. Meho estas multejara membro de SAT. Meho estis unu el elstaraj organizantoj de grandaj Esperantaj kunvenoj, naciaj kaj internaciaj kongresoj. Meho mem, kun sia familio, partoprenis multajn Universalajn kongresojn. Li estas unu el fondintoj de la Trilanda konferenco, kaj ĝis nun li partoprenis al ĉiuj 16 Trilandaj konferencoj.

Meho konas persone preskaŭ ĉiujn Esperantajn eminentulojn, jugoslaviajn kaj tutmondajn. Meho en sia familio gastigis sennombran aron da esperantistoj. La lastaj tiaj gastoj en lia hejmo estis la ĉina ĵurnalistini Li Yuping, kaj poste la geedzoj Goodheir el Skotlando.

Meho regule partoprenas al niaj ludaj kunsidoj kaj aliaj kunvenoj en la societejo de "A.Š.Turković".

Viva Meho, feliĉe kaj ĝoje.

Rado Škalamera

MONUMENTO

AL IVANKA TROHAR

Dum la celebrado de la 200-a datreveno de la elementa lernejo en Fužine (Gorski kotar), krom aliaj solenaĵoj, oni starigis kaj solene malkovris la 15-an de junio 1985. skulptitan buston de Ivanka Trohar, do daŭran monumenton al tiu Fužinano popola Heroino.



TROHAR IVANKA, lernantino, naskiĝis la 17-an de januaro 1923 en Fužine. Esperantiĝis en 1939 kaj tiujare konatiĝis kun la gvidantoj de SKOJ kaj KP. En la jaro 1941, tuj post la okupado de la lando, aktiviĝis en ribelo, kolektante nutraĵon, armilojn, municion por la partizanoj. Fariĝis membro de Distrikta komitato de SKOJ por Delnice, kaj ekde 1942 membro de KPH. Ŝi aliĝis kiel batalanto al bataliono "Matija Gubec" kaj ŝia merito estas ke jam en la jaro 1942 la Primorsko-goranski odred (Apudborda-montara taĉmento) havis junularan roton. Ŝi organizis laborrotojn kiuj helpis al la popolo de bruligitaj vilaĝoj kaj en evakuado de vunditoj.

Ivanka Trohar naskiĝis la 17-an de januaro 1923. en Fužine. Ŝi esperantiĝis kiel lernantino en la jaro 1939. Tiujare ŝi konariĝis kun la gvidantoj de SKOJ kaj KP. En la jaro 1941, tuj post la okupado de la lando, ŝi aktiviĝis en ribelo, kolektante nutraĵon, armilon, municion por la partizanoj. Fariĝis membro de Distrikta komitato de SKOJ por Delnice, kaj ekde 1942. ŝi estiĝis membro de KPH. Ŝi aliĝis kiel batalanto al bataliono "Matija Gubec" kaj ŝia merito estas ke jam en la jaro 1942. la Primorsko-goranski odred (Apudborda-montara taĉmento) havis junularan roton. Ŝi organizis laborrotojn kiuj helpis al la popolo de bruligitaj vilaĝoj kaj en evakuado de vunditoj.

Ŝi parolis dum la Unua kongreso de SKOJ en 1942. La malamika ofensivo en oktobro 1944. trovis ŝin sur la tereno de Brod na Kupi. En proksimo de tiu urbeto kaptis ŝin ustaŝoj. Dum 20 tagoj daŭris

la torturoj kaj transportado ŝia de unu al alia arestejo ĝis la kondamno je morto. Al eŝafodo, en vilaĝo Draganići, apud Karlovac, ŝi iris kuraĝe kontante.

La 27-an de julio 1953. ŝi estas proklamita Popola Heroo.

(Laŭ Leksikono de Gjivoje)

LA GEEDZOJ GOODHEIR EN LA RONDO DE ESPERANTISTOJ EN RIJEKA

La aŭtoro de dek libroj skribitaj Esperante, profesoro Albert Goodheir kun sia edzino Phyllis, ankaŭ ŝi fervora esperantistino, estis en Rijeka la 19-an, 20-an kaj 21-an de majo 1958.

La kara esperantista paro venis al Rijeka el Pula, kie ili estis gastoj de d-ro Ivo Boroveški. La unuan tagon, ilia gastiginto en Rijeka Meho Jakupović kaj mi akompanis ilin al la kastelo Trsat kaj de tie ni montris al ili la panoramon rakontante pri paseoj kaj nun la nia urbo kaj ŝia ĉirkaŭaĵo.

La duan tagon ni montris al la gastoj Optičku kaj vespere nia ESocieto okazigis renkontiĝon de gesinjoroj Goodheir kun la rondo de esperantistoj en Rijeka. Profesoro Albert Goodheir parolis al ni tre interese pri sia hejmlando, pri Skotlando, pri ŝia naturo, ŝia popolo, ŝiaj moroj ktp. La vortojn akompanis bele-

gaj lumbildoj, centoj da belegaj koloraj bildoj.

La trian tagon Meho kaj mi akompanis la geedzojn al ekskurso sur la insulo Krk. Unue ni vizitis "Vila amara" en Žurkovo, poste Malinskan, Krk, Dunat kaj returne al nia hejmo.

La kvinatan tagon ili ŝipveturis al Rijeka al Split. En Split samideano Hrotić per afiŝoj anoncis la elvenon de fama esperantisto el Skotlando kaj lian prelegon okazontan ĉe Ekonomia fakultato. De Split la geedzoj foriris al Dubrovnik.

Ĝuste unu monaton post la elveno de Goodheir al Rijeka, la 19-an de junio mi ricevis perpoŝte pakadon el Skotlando. Doktoro Goodheir sendis al mi siajn kvin librojn kiujn mi ne posedis. Nun mi havas ĉiujn dek libroformajn esperantajn verkojn de Albert Goodheir. Dankon al ĝentila samideano.

Rado Skalamera

Du trionoj de la mondo parolas dekkvin lingvojn

La nuntempa homaro konsistas el pli ol kvar miliardoj da homoj. Ili parolas pli ol 3.000 diversajn lingvojn. La plej parolatajn 15 lingvojn parolas du trionoj de la monda loĝantaro. Tiuj dekkvin lingvoj estas: ĉina (unu miliardo, aŭ 20 procentoj da monda loĝantaro), angla (500 milionoj, 10 procentoj), rusa (250,5%), hispana (240,4.8%), hindi (200,4%), araba (150,3%), portugala (140,2.8%), germana (120 - 2,4%), japana (118 - 2,25%), bengala (108 - 2,15%), indonezija (100 - 2), franca (80 - 1,6), itala (60 - 1,2), urdu (56 - 1,6) kaj korea (47 - 0,94%).

Kroat-serba lingvo okupas 39-an pozicion (18 milionoj, 0,36% de la monda loĝantaro).

Pli ol unu miliono da homoj parolas 150 lingvojn, nome 150 lingvoj estas parolataj far pli ol unu miliono da homoj.

Kie troviĝas Esperanto? Malfacile estas doni precizan respondon. Pritaksoj pri Esperanto-parolantoj ŝanceliĝas inter unu miliono kaj dek milionoj. Meniu scias la veran ĝustan nombron. Sed, nun ekzemple nur en Ĉinujo Esperanton lernas pli ol ducent mil homoj.

R.Š.

INTERVJUOJ



Intervjuinta
dr Domenika Vanić

"Malgranda princo"

La grupo "Mali princ" ("Malgranda princo") en Rijeka, estis fondita en la jaro 1980. Ĝiaj membroj estas: UTE RAPOTEC - klavaroj, GORDAN STANKOVIĆ - klavaroj, BRUNO NACIMOVICH - vokaloj, BRUNO BARIČEVIĆ - gitaro, ŽELJKO KIRINČIĆ - baso, MILJENKO GRŽALJA - - saksofono, TONČI GRABUŠIĆ - tamburoj.

La unuan debuton en publiko la grupo faris en ĉi jara Festivalo Split, postkiam ĝi gajnis sincerajn simpatiojn de la publiko kaj tre bonajn pritaksojn de muzikkritikistoj.

- Baldaŭ aperos la unua "LP" disko de "Malgranda princo"?

UTE: Jes, en decembro. Ĝi promoviĝontos en MESAM, t. e. en internacia festivalo de amuzmuziko en Beograd per la kanto "Ivana". Ni laboris 4 jaroj klopodinte prezenti valoran materialon por la disko. Ni estas tre kontentaj pri nia farita laboro kaj mi pensas ke la nian opinion dividos ankaŭ la publiko kaj la kritiko.

- Kiaj estas la planoj de la grupo "Malgranda princo"?

UTE: Daŭrigi la laboron, prezenti la disko al publiko kaj, memkompreneble, doni koncertojn, ĉar tio estas ververe la fina celo - viva renkontiĝo, rekta kontakto kun la publiko por kiu oni laboras.

- Kion vi opinias pri Esperanto kiel internacia lingvo?

UTE: Esperanto estas unu el unikaj manieroj por ke la homoj en la mondo interligiĝu, kaj, memkompreneble, ke ili pli


bone interkompreniĝu. Esperanto helpas al ili ke interŝanĝu sian
ajn spertojn kaj pensojn, ke ili ekkonstruu amikecon daŭrontan
la tutan vivon. Esperanto estas ankoraŭ unu el tiom necesaj ga-
rantioj por la paco en la mondo.

Domenika Vanić

Florido

Preŝaj kukoj
varma lakto kaj glaciaj',
kusenoj ardaĵ de via korpo,
instinkte mi serĉas
vian lipsomeron,
vi okulumildas
degeligante min ĉarme
Florido,
Florido,
ĝuste laŭ Florido
vi odoras oceane kaj ŝanele 5.
Tute okaze
tute belege kaj senplane,
kun vi la eterneco
estas nur larmotrem',
kaj taga parto.

Esperantigis R.Š.



Interprenos: "MALI PRINC"

La grupo "Mali Prino"



De maldekstre dekstren: Miljenko Gržalja, Željko Kirinčić, Bruno Nacinovich,
Bruno Baričević, Gordana Stanković, Damir Mihanović, Ute Rapotec

LA LINGVO FUNDON NE HAVAS

Ĉiama ripetado kaj facilanima troigado pri la facileco de Esperanto povas esti tre danĝera. Kvankam Esperanto ververe estas sep ĝis dek fojoj pli facila ol iu nacia lingvo, tamen ankaŭ Esperanton oni devas serioze lerni kaj bone ellerni. Ĉar, Esperanto estas vera lingvo, kaj, kiel diris la fama esperantologo Atanas D. Atanasov, lingvo fundon ne havas.

Timigi komencanton emfazante malfacilecojn havus nenian sencon. Sed la veron, la tutan veron oni diru tuj. Sen pena lernado ne eblas ellerni lingvon. Kial oni menci tiu? Tial ĉar oni bone scias kio okazas en praktika vivo. Bone konataj estas la ĉiamaj, dumvivaj komencantoj, balbutantoj, "bonan-tagon, ĝis-revido" esperantistoj kaj la "krokodiloj".

Pri esperantistoj ne parolantaj Esperanton oni ofte diskutis en la E-movado. Jam antaŭ pli ol unu duono da jarcento (ĝuste en la jaro 1933) Julio Baghy verkis la mok-poemon "Estas mi esperantisto?" Ni citu ĉi tie nur kelkajn versojn el tiu ofte citita poemo:

Tedas min la vorto-listo;
 estas mi esperantisto.
 Gramatikon mi ne konas
 kaj gazeton ne abonas
 Librojn legu la verkisto;
 estas mi esperantisto.
 Mi parolas kun rapido:
 "Bonan tagon! Ĝis revido!"
 Ĝi sufiĉas por ekzisto;
 estas mi esperantisto.

Evidentas ke esperantistoj-balbutantoj estis ĉiam en E-movado specifa kaj grava problemo. Jes, problemo, ĉar ili fakte prezentas vivan kontraŭpropagandon al Esperanto. Granda parto de la kulpo por tia stato, sendube, felas sur la kapoj de tiuj fanfaronuloj kiuj troigas kaj mallerte eksplikas la facilecon de la lingvo. La kulpuloj estas verŝajne precipe tiuj "ŝercemaj", bonintencaj propagandistoj kiuj promesas tujan grandan profiton kaj kiuj reklamas

ke Esperanton ellerneblas dum kelkaj tagoj, eĉ dum unu semajnfino en tiel nomataj "ekspresaj kursoj", anstataŭ honeste deklari ke en kelkaj horoj oni povas plene informiĝi pri la problemoj kaj ekkoni, memkompreneble, nur la elementan pasivan scion pri la strukturo de internacia lingvo. Per tiu informo oni ricevas la unuan instigon kaj inciton iri plu, marŝi antaŭen por penetri iom post iom en la mirindan, riĉan mondon de la Esperantujo, de ĝiaj lingvo, kulturo kaj movado.

La lingvo fundon ne havas. Oni ĝin lernas dum la tuta vivo. La plej bonaj konantoj de la lingvo aprecas kaj respektas tiun fakton. Ili bone konscias ke en la lingvo oni ĉiam trovas ion novan, ion evoluantan. Iĝas novaj nocioj, novaj esprimoj, novaj vortoj.

Do, vortoj, vortoj. Nenio sen vortoj.

Vorto laŭ PIV estas areto da artikigitaj sonoj, havanta difinitan signifon kaj difinitan gramatikan uziĝon.

Eblas relative facile kaj rapide kompreni kaj percepti la 16 fundamentaj reguloj de la E-gramatiko, sed vortoj oni nepre devas lerni, memori, ellerni. Kiom da vortoj oni devas ellerni? Kiom da vortoj ekzistas entute?

Al tiuj demandoj mi provu respondi per ĉi tiu artikolo. Sed, antaŭ ĉio kelkaj aliaj demandoj sin altrudas. Kian lingvon ni volas paroli? Ĉu simplan, primitivan kaj malriĉan, aŭ tamen simplan kaj belan sed riĉenhavan, esprimoplenan, evoluitan, kulturan lingvon, indan kaj adekvatan al postuloj, bezonoj kaj necesoj de moderna, instruita monda civitano?

Ĉiu havas sian propran lingvon. Ĉiu havas sian vortaron. Elektebleco estas tre granda.

Vortoj kaj vortaroj

Ne sufiĉas nur kompreni vortojn, pasive ekkoni signifon de la vorto. Necesas aktive uzi ĝin, posedi ĝin entute. Vidu ni kiom da vortoj uzas diversaj homoj.

"Heroldo de Esperanto" en la numero de la 16. de Junio 1953. publikigis ĉi tiun informon: "Lingvoj kaj vortaroj". Esploroj de Franca Akademio de Sciencoj eltrovis ke sur la tero estas parolataj 6760 lingvoj. La ĉiutaga lingvo de klera homo postulas ne plu ol 5-6000 vortojn. "Iliado" kaj "Odiseo" de Homero enhavas kune 9.000 vortojn, La Malnova Testamento 5.600, La Nova 4.800, la verkoj de Goethe ĉ. 11.000. Ŝekspiro uzis en siaj 37 dramoj la admirindan nombron de 24.000 diversaj vortoj."

D-ro Ivo Lapenna en sia verko "La Internacia Lingvo" (Faktoj pri Esperanto) en la jaro 1954. sur la paĝo 21 skribas:

"La kleraj homoj uzas meze ĉ. 3.000 - 4.000 vortojn. Nur grandaj pensuloj kaj verkistoj posedis meze 10.000 vortojn, dum la tuta Malnova Testamento estas skribita per 5.642 vortoj."

D-ro Ivo Lapenna en sia verko "Retoriko" sur la paĝo 80 skribas:

"Shakespeare uzis en ĉiuj siaj dramaj verkoj ĉ. 15.000 vortojn, dum aliaj taksis je 16.000 la malsamajn vortojn, kiujn li uzis en sia tuta verkaro. Laŭ M. Pei, oni elkalkulis, ke Racine uzis en ĉiuj siaj verkoj nur 6.000 vortojn, dum la verkaro de Viktor Hugo estis skribita, laŭ kelkaj, per 20.000 vortoj. La tuta literatura vortaro de Milton estas taksata inter 8.000 kaj 11.000 vortojn. Bona oratoro devus posedi ĉ. 8.000 ĝis 10.000 vortojn. En Esperanto la aktiva posedo de ĉ. 3.000 radikoj donas vere abundan vortprovizon."

Ni citu ankoraŭ informon el "Esperanto" Junio 1972: La vortprovizo de Homero estis 9.000 vortojn, de Schiller, 16.000, de Shakespeare 20.000, de Puŝkin 21.000. Por ĉiutaga uzado de inĝenieroj, kuracistoj, juristoj, instruistoj sufiĉas 10.000 vortojn.

Diru ni ankaŭ tion ke neinstruita kamparano uzas ne pli ol 500 vortojn.

Vortaro neniam estas finita

La plej fama vortaristo de Esperanto Gaston Waringhien skribis ke vortaro estas io sama kiel mastrumado - la tasko neniam estas finita. Li skribis ankaŭ ke la idealo de bona vortaro estas respeguli la lingvon uzatan en unu pli-malpli vasta medio kaj en unu pli-malpli limigita tempo. Alivorte, Waringhien substrekas la fakton pri la konstanta evoluado kaj ŝanĝado de la lingvo. Tial oni devus unue distingi unu vortaron de alia. Ĉar vortaroj estas diversspecaj: ĝenerala vortaro, historia vortaro, frekvencomorfemaro, terminaro, temvortaro, frazaro, dialekt-vortaro, estimologia vortaro, leksikono de aforizmoj, enciklopedio...

En tiu ĉi enkonduko al trarigardo de vortaroj estu mencienda ankoraŭ tio: membroj de la sama lingvo ne parolas same, ĉar ekzistas en unu lingvo diversaj lingvoj: familia, kamparana, urba, eklezia, lerneja, ĵurnalista, politika, administracia, scienca kaj multaj fakaj...

Kaj nun jen kiom da vortoj entenas unuopaj vortaroj:
 "Rječnik hrvatskoga ili srpskoga jezika" (JAZU) entenas 250.000 vortojn, "Webster's World Dictionary of the American Language" enhavas 140.000 vortojn (anglo-saksa lingvo havis 50.000 vortojn, Middle English 100.000-120.000 kaj la nuntempa angla teorie havas 650.000 vortojn). "Webster's Third International Dictionary" (Britannica), 1966. enhavas 450.000 vortojn. "The Concise English Dictionary, 1984, Hayward-Sparkes, enhavas 130.000 vortojn kaj frazojn. "Srpskohrvatsko-engleski rečnik" far Morton Benson, 1981 - 60.000 vortojn, "Talijansko-hrvatski ili srpski rječnik" far Dea-nović-Jernej, - 50.000 vortojn. "Veliki rječnik stranih riječi" far B.Klaić, 1974 - 50.000 vortojn, "Turcizmi u srpskohrvatskom jeziku" far Abdulah Škaljić, 7.400 vortojn.

Vortprovizo de Esperantaj vortaroj

La Unua Libro de Zamenhof havas 46 paĝoj. Ĝia vortaro konsistas el 920 radikoj. La lernolibro "Esperanto" laŭ la t. n. Zagreba metodo enhavas 500 radikojn, nome la plej oftaj 500 radikoj. La ofteco de vortoj estis konstatita per komputila analizo de la ĉiutaga parolo ampleksanta ĉirkau 60.000 vortojn.

"Plena ilustrita vortaro" (PIV), la plej bona, la plej ampleksa Esperanta vortaro enhavas 1303 paĝoj, 15.250 artikolojn, 42.000 vortojn el kiuj oni povas fari almenaŭ 150.000 vortojn.

900 vortarojn, 2.500 lernolibrojn

La Instituto por Kibernetika Pedagogio en Paderborn (Germanio) inter aliaj sciencaj laboroj celas per eksperimentoj elabori novajn instru-sistemojn, programojn, programitan instruadon kaj novaj teknikajn rimedojn. La eksperimentoj interalie montris, ekzemple, ke du mil horojn bezonas francoj kaj italoj por lerni la german. lingvon, dum la angloj bezonas 1.500 horojn por lerni la germanan, nederlandan, danan, francan aŭ italan. Ĉiuj nomitaj lingvanoj povus lerni Esperanton dum 150 horoj!

Jes, dum 150 horoj, serioze lernante, oni povas ellerni Esperanton por povi kompreni kaj paroli. Kaj poste ĉiam diligente praktiki, legi kaj paroli!

Ekzistas multaj lernolibroj, vortaroj, metodoj por lerni Esperanton. Ekde Zamenhofs Unua Libro ĝis hodiaŭ, en la periodo de preskaŭ cent jaroj aperis ĉirkaŭ 2.500 lernolibroj en 70 lingvoj. Ekde Zamenhof ĝis la jaro 1982. aperis 900 Esperantaj vortaroj (La plej grandan kolekton da vortaroj posedis Marinko Gjivoje preskaŭ ĉiuj 900.)

Memkompreneble, Esperanton oni lernis kaj lernas laŭ diversspecaj metodoj, laŭ la "klasika" gramatika metodo, kaj laŭ la rekta, Cseh-metodo, laŭ aganta, laŭ naliza-aŭtomata, laŭ aŭdovida, laŭ la metodo de Berlitz, laŭ dedukta, laŭ indukta, laŭ intensa, laŭ mekanika-aŭtomata, laŭ moderna elektanta, laŭ natura, laŭ trompa... laŭ Freinet-pedagogio, laŭ Zagreba metodo. Ĉiu metodo, krom la trompa, povas esti bona, se oni ĝin uzas bone, kaj se oni lernas volonte, diligente, obstine, persiste, malcedeme.

Kiom da lecionoj enhavas Esperantaj lernolibroj? Ne ekzistas iu regulo. Rigardu, ekzemple, kelkajn kroat-serbajn: "Esperanto u deset lekciija" estis sisteme tre populara lernolibro kies aŭtoro estas d-ro Ivo Lapenna, de lernolibro en 10 lecionoj, "Meĉunaroĉni jetik Esperanto" far Imbert, Sekelj, Špoljarec, Štimec, Tišljar (tiel nomata Zagreba metodo) konsistas el 12 lecionoj, "Esperanto za samouke i škole" far d-ro Dušan Maruzzi havas 18 lecionoj, "Meĉunaroĉni jezik Esperanto" far Gvozden Srediĉ 24 lecionoj, "Esperanto za svakog" far Emilija Lapenna 30 lecionoj, "Esperanto en tridek lecionoj" far F. Novljan kaj "Esperanto" far Božidar Vanĉik 34 lecionoj. Vanĉik en antaŭparolo al sia lernolibro skribis ke lia kurso (dufoje semajne po unu horo) daŭras 6-8 monatoj aŭ 50-70 horoj.

Ĉiuj menciitaj lernolibroj estas lernolibroj por komencantoj, kaj ĉiuj estas bonaj. Malbonaj lernolibroj estus nur tiuj kiuj fanfaroneme promesus "Ludante vi majstros lingvon en 30-taga rapid-kurso" aŭ ion similan. Tre rapide oni povus akiri nur tre elementan komencan scion.

"Fundamento de Esperanto" far d-ro L.L.Zamenhof el la jaro 1893, konsistis el 16 gramatikaj reguloj, el 42 paragrafoj de la Ekzercaro, kaj el la Universala Vortaro kun 2.600 radikoj.

Por progresintoj menciindaj estas ĉi tiuj lernolibroj: "La tuta Esperanto" far Henrik Seppik en 20 lecionoj, "Amuzaj dialogoj" far Lienhardt en 20 lecionoj, "Paŝoj al plena posedo" far W. Auld en 30 lecionoj (Auld diras: 30 paŝoj, Kiel diri..?" far Lentaigne, praktika Esperanta frazeologio grupigita ĉirkaŭ 67 "ideoj".

Por pli profunde studi Esperanton ĉiu havas je dispono valoregajn verkojn de elstaraj esperantologoj ekde Zamenhof, Kaloczay, Waringhien ĝis Szerdahelyi. Citinda estas la unua frazo de la antaŭparolo al "Privilegia vojo al lingvoscio Esperanto" far Vilho Setälä: "Ĝu vi scias, ke la plej interesa kaj inteligenta

maniero lerni lingvon estas studi ĝian literaturon?" Tial ni menciis ankaŭ du bonajn librojn: "Gvidlibro por supera ekzameno", Budapeŝto, 1979, kaj "Baza literatura krestomatio", Budapeŝto, 1979.

La vortfarado

La vortfarado okupas grandan parton de la gramatiko. Ekzemple en "Priručna gramatika hrvatskoga književnog jezika", Ŝkolska knjiga, Zagreb, 1979, el entute 500 paĝoj, 86 paĝoj aŭ preskaŭ unu kvinono entenas vortfaradon (Tvorba riječi). En la kroata lingvo oni havas ĉirkaŭ 400 afiksojn (prefiksoj, interfiksoj kaj sufiksoj).

En "Plena analiza gramatiko" (PAG) far Kalocsay kaj Waringhien, el 600 paĝoj de la libro, 150 paĝoj okupas vortfarado, do unu kvarono de la gramatiko.

Videbla estas la diferenco. Sed, plej grave estas ke per 400 afiksoj en kroata lingvo ordinara homo povas krei nenium novan vorton, kaj per 36 afiksoj en Esperanto ĉiu esperantisto povas krei sennombrajn novajn vortojn! Tie troviĝas la forto de Esperanto, ĝia simpleco kaj ĝia riĉeco.

Zamenhof en sia 42-a paragrafo de la Ekzercaro montris kiel oni povas el unu radiko fari 52 derivaĵojn:

sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo
sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane,
malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta, malsanema, mal-
sanulejo, malsanulisto, malsanero, malsaneraro, sanigebla, sanigisto,
sanigilo, resanigi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo,
sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanulaĵo, mal-
saneco, malsanemeco, saniginda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, re-
malsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsa-
nulista k.t.p.

Vidu, Zamenhof elnombris 52 derivaĵojn kaj aldonis "k.t.p.", kaj tiel plu antaŭen novaj vortoj.

En "Plena ilustrita vortaro" (PIV), ekzemple, ĉe la vortoj: pasi, veni, lerni, ami, skribi, homo, koloro, havi, povi, bona, devi, fari, diri, vidi, ebla, doni, pensi, paroli, labori, tiri, me-
ti, esti, voli, iri, preni, aŭtoro donis multajn derivaĵojn. Preci-
ze el radikoj de tiuj 25 vortoj vortaristo faris 820 derivaĵojn el
ĉiu radiko meznombro po 33 vortojn! El la radiko ir-pere de afiksoj
kaj pere de kunmetado ni faru kelkajn 80 vortojn:

iri, iro, iradi, irado, irantaro, irebla, irejo, irigi, iriloj, iro-reiro, aliri, aliro, alirebla, alirejo, antaŭiri, antaŭeniri, ĉirkaŭiri, deiri, deirpunkto, disiri, ekiri, ekiro, eliri, eliro, elirejo, eniri, eniro, enirejo, foriri, laŭiri, malsupreniri, neirebla, postiri, preteriri, preterirejo, reiri, reeniri, retroiri, senclira, senelirejo, subiri, supreniri, suriri, trairi, trairebla, netrairebla, trairejo, transiri, transiro, transirebla, transirejo, transirigi, anasiri, ĉieliro, flankeniri, hejmeniro, inversiri, kontroliro, krucmilitiro, militiro, piediri, rondiri, savelirejo, ŝipiri, ŝteliri, vicirado, vojiro, ekvojiro, zagzagiro, iranto, preteriranto, postiranto, reiranto, supreniranto, ŝteliranto, piediranto, flankeniranto, ktp, ktp...

Simpleco kiel avantaĝo

La famkonataj "Ĝlosiloj de Esperanto" far Ĉefeĉ, en ĉiuj eldonoj ripetadis ĉi tiun citaĵon:

"Simpla, fleksebla, helsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de lingvo internacia; ĉar, tre facila por homoj ne multe instruitaj, Esperanto estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj. Mil faktoj atestas la meriton praktikan de la nomita lingvo".

La unua vorto en tiu ĉi citaĵo estas "simpla". Simpleco estas vere avantaĝo de Esperanto komparante ĝin kun naciaj lingvoj. Ĉar, ekzemple, ĝis nun Esperanto ne abundas per homonimoj nek per sinonimoj. Eble oni dirus ke tio povas signifi iun malriĉecon kaj malforton de la esprimpovo, sed observu kaj pripensu: en la angla lingvo la vorto "ground" signifas grundo, sed ĝi havas ankoraŭ 49 aliajn signifojn! Angla vorto "cut" signifas tranĉi, sed krome ĝi havas ankoraŭ 61 signifon. Angla vorto "stand" signifas stari, sed ĝi havas ankoraŭ pli ol cent aliajn signifojn!

Por la nocio "ĉevalo" en araba lingvo ekzistas ĉirkaŭ 200 diversaj vortoj (sinonimoj)!

Ni konkludu. Kion signifas ellerni lingvon? La ĝusta demando estus: kiom ellerni. Kiom oni konas sian propran, gepatran lingvon? Ankaŭ pere de supraĵa scio oni povas paroli flue, lerte, rapide, sed tio tamen estus nur praktika "kelnera" lingvo. Cetere la lingvo estas profunda, multetavoleca, neelĉerpebla, ĉar ĝi fundon ne havas.

Rado Ŝkalamera

INTERNACIA GEJUNULA RENKONTIĜO

Je la 24-an de majo en Rijeka alvenis la grupo de junaj austrianoj kiu lernas Esperanton laŭ zagreba metodo. Esperanta grupo de Elementa lernejo "Podmurvice" estas invitita ke partoprenu je tritaga seminario.

Dum la seminario ni devis kontakti kun niaj samaĝuloj esperante. Atendante niajn gastojn, ni estis tre emociitaj. Ni multe atendis de tiu renkontiĝo. Ĝiuj problemoj estas solvita kiam alvenis niaj gastoj kun ilia instruisto Karlo Hirmann.

Irena Barković
Jasna Barković

Komence ni ekrigardis unu la aliajn kaj ni proksimiĝis al ili. Poste ni komencis paroli. Gernot, Ildiko kaj Klaudija estis tre trankvilaj geknaboj. Ili estas konfuzitaj ĉar ni parolis tre late. Ni deziris ke ili fartu agrable. Niaj petolemaj voĉoj tuj altiris blondharan knabon kun blujaj okuloj kiu komencis konverzacian.

Tiu knabo estis Bernd, petolema lernanto kiu ŝatis ŝerci. Li ankaŭ estas la lingvotalenta knabo. Dum restado kun ni li eklernis multajn kroatajn vortojn. Ili estis gastoj en niaj domoj. Ni esperas ke ili fartis agrable.

Sanja Stanojević
Jagoda Halužan

Dum seminario ni estis tre okupitaj ĉar ni multe lernis. Sur seminario prelegis al ni profesoro Slobodan Vitolović. Ni preparis por fina egzameni, kompreneble, ni estis timemaj.

Mirjana Vukelić, instruistino de nia esperanta grupo.

diris al ni ke tiu egzameno estas nur la unua ŝtupo kiu gvidas en plena posedo de internacia lingvo. Ni sukcese pasis examenon.

Dum posttagmezaj horaj ni ekkursis kaj nia gvidanto estis kamarado Radoslav Škalamera.

La tempo trapasis rapide. Estis bele kaj ekscite. Valter Šverko, sekretario de Esperanta societo "A.Š. Turković" deziris ke tiu unua renkontiĝo kun eksterlandaj esperantistoj estu por ni bela memoraĵo, kaj ke ne estu la unua kaj lasta.

Ni akompanis ilin al la stacidomo kaj kore adiaŭis ilin kun deziro "...ĝis revido en Graz".

Arijana Jovanović

Rozo por vi

Ni estas sur la stacidomo.
 La trajno estas preta por vojaĝi.
 Ĝuru tre forte radias.
 Lia ganto Bernd aproksimiĝas al ni.
 Lia bluzoj okuloj brilas. En la mano
 estas unu rozo.

"Jagoda, tio estas por vi!"

"Danke", mi diris.

Ni ridetas. Ni estas ĝojaj.
 Esperanto kaj rozo kunligis nian
 amikecon.

Jagoda Halužan
 Elementa lernejo
 "Podrumovce"

INFORMO AL TUTMONDA ESPERANTISTARO

MIL ŜERCOJ EL TUTMONDO

"MIL ŜERCOJ EL TUTMONDO" estas labortitolo de la libro kiun mi kompile preparas. Ĝis nun mi elektis UNU ŜERCON, sed mankas ankoraŭ - 999 ŜERCOJ?!

Ŝercemuloj, spritemuloj, humuremuloj, ridemuloj kaj ridigemuloj, distremuloj kaj distrigemuloj... kaj ĉiuj aliaj skribemuloj, verkemuloj kaj kunlaboremuloj, mi atendas viaj kontribuojn!

Sendu al mi kolekton de dek altkvalitaj kaj internacie kompreneblaj ŝercoj el via lando kaj vi havas unikan okazon kaj ŝancon almenaŭ per unu ŝerco eternigi ("antologiigi", "enciklopediigi"... kuraĝas mi eĉ diri!) vian nomon en libroforma ŝercokolekto tutmonda.

Desegnaĵojn ilustrantaj unuopajn ŝercojn estas dezirataj!

Eblas anticipa aperigo en "OVO" - internacia gazeto por distro kaj amuzo. kies ĉefredaktoro mi estas!

Mi kore antaŭdankas por ĉiu plua disvastigo kaj diskonigo de tiu ĉi informo, tutegele en kia formo!

Limdato por alsendo de kontribuajtoj: 31-a de decembro 1985!

Ne tro meditu, ne hezitu, ne prokrastu... agu - TUJ!

Slavko Ŝimunić
JURNALISTO
YU-41000 Zagreb, Creska 18
JUGOSLAVIO



SEN PAROLOJ

10. 10. 10